Unua Informilo

Esperanto-kursoj en Havano antaŭ la UK

Amerika Komisiono invitas al kursoj:

Esperanto I (komencintoj *[1])
Esperanto II (komencaj progresantoj*[2])

Havano, 11 – 17 julio 2010

Loko:

La kursoj okazos en Havano, do en la UK-urbo tuj antaŭ la Universala Kongreso.

Celgrupo:

Esperanto I: La kurso estas por personoj kiuj havas tre bazan nivelon (ekzemple lernante per Lernu aŭ aliaj aŭtodidaktaj kursoj; nivelo A1, A2 laŭ la eŭropa referenckadro pri lingvoj) kaj kiuj volas altigi la lingvonivelon iomete antaŭ la UK. Teorie ĝi ankaŭ taŭgas por personoj kiuj lastmomente decidas partopreni la Universalan Kongreson kaj mem akiras bazajn sciojn nur kelkajn semajnojn antaŭ la komenco de la UK. Dum la semajno ni volas kune altigi la vortprovizon kaj ekzerci la konversacion kun speciala atento al UK-situacioj. Krome ni ripetos bazajn gramatikaĵojn.

Esperanto II: La kurso estas por personoj kiuj jam regas Esperanton iomete pli bone kaj kiuj volas perfektigi la lingvokonojn por havi pli fluan konversaci-eblon dum la UK (nivelo A2, B1 laŭ la eŭropa referenckadro pri lingvoj). Dum la semajno ni volas trejni la konversaciadon kaj ni ripetas gravajn gramatikaĵojn. Ni parolos ankaŭ pri la UK kaj pri la diversaj programeroj dum ĝi. La kurso tre taŭgas por prepari la partonprenon en la UK.

Programo / Temoj:

La kursoj inkluzivos entute 25 lernohorojn (po 45 min.) dum la tuta semajno. Restos spaco por babilado ekster la kurso kaj por vesperaj ekskursoj (kostoj ne inkluzivaj).

Prezoj:

La kursoj estas eksterordinare favorprezaj, ĉar ni volas ebligi al plejeble multaj homoj ĝui la kursojn kaj prepari sin pli bone al la postaj kongresaj eventoj (UK kaj IJK). La kostoj inkluzivas la kurson, loĝadon (modestaj lokoj, kvarlitaj ĉambroj) du manĝojn kaj la transporton de la flughaveno.

	A) ĉiuj landoj krom B	B) B-Landoj
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-03-05	220,00 EUR	150,00 EUR
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-05-05	250,00 EUR	170,00 EUR
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-06-30	280,00 EUR	190,00 EUR
poste kaj surloke (se lokoj estas)	310,00 EUR	210,00 EUR

Se la partoprenanto mem volas serĉi hotelon aŭ tranokteblecon la prezoj reduktiĝas:

Partopreno sen manĝoj: - 50,00 EUR
Partopreno sen tranokto: - 50,00 EUR

Pliaj informoj kaj aliĝoj:

Por ricevi pliajn informojn skribu al:
kubo2010@esperanto-mexico.org